**PREĜINTENCOJ DE LA SANKTA PATRO**
**KONFIDITAJ AL LA PAPA TUTMONDA PREĜO-RETO**
**POR LA JARO 2026**

## JANUARO

**Por la preĝo kun la Vorto de Dio**
Ni preĝu, por ke la preĝo kun la Vorto de Dio estu nutraĵo en niaj vivoj kaj fonto de espero en niaj komunumoj, helpante nin konstrui pli fratan kaj misieman Eklezion.

## FEBRUARO

**Por infanoj kun nekuraceblaj malsanoj**
Ni preĝu, por ke infanoj trafitaj de nekuraceblaj malsanoj kaj iliaj familioj ricevu la necesajn medicinan prizorgon kaj subtenon, sen iam perdi forton kaj esperon.

## MARTO

**Por senarmigo kaj paco**
Ni preĝu, por ke la nacioj iru al efektiva senarmigo, aparte al nuklea senarmigo, kaj por ke mondaj gvidantoj elektu la vojojn de dialogo kaj diplomatio anstataŭ perforto.

## APRILO

**Por pastroj en krizo**
Ni preĝu por la pastroj, kiuj frontas momentojn de krizo en sia vokiĝo: por ke ili trovu la akompanadon kiun ili bezonas kaj por ke la komunumoj subtenu ilin per kompreno kaj preĝo.

## MAJO

**Por nutraĵo por ĉiuj**
Ni preĝu, por ke ĉiu - de grandaj produktantoj ĝis malgrandaj konsumantoj - engaĝiĝu por eviti nutraĵmalŝparon kaj por ke ĉiu persono havu aliron al kvalita nutrado.

## JUNIO

**Por la valoroj de sporto**
Ni preĝu, por ke sporto estu ilo de paco, renkonto kaj dialogo inter kulturoj kaj nacioj kaj por ke ĝi antaŭenigu valorojn kiel respekton, solidarecon kaj personan pliboniĝon.

## JULIO

**Por la respekto de la homa vivo**
Ni preĝu por la respekto kaj defendo de la homa vivo en ĉiu ĝia etapo, rekonante ĝin kiel donacon de Dio.

## AŬGUSTO

**Por la evangelizado en la urboj**
Ni preĝu, por ke en la grandaj urboj, ofte markitaj de anonimeco kaj soleco, ni sukcesu trovi novajn formojn por anonci la Evangelion, malkovrante kreivajn vojojn por konstrui komunecon.

## SEPTEMBRO

**Por la zorgo pri akvo**
Ni preĝu por justa kaj daŭripova mastrumado de akvo, vivgrava rimedo, por ke ĉiuj havu justan aliron al ĝi.

## OKTOBRO

**Por la paŝtista animzorgado de mensa sano**
Ni preĝu, por ke la paŝtista animzorgado de mensa sano integriĝu en la tutan Eklezion, helpante superi stigmaton kaj diskriminacion kontraŭ personoj kun mensaj malsanoj.

## NOVEMBRO

**Por la bona uzo de riĉeco**
Ni preĝu por bona uzo de riĉeco kiu ne cedas al la tento de egoismo, sed ĉiam servas la komunan bonon kaj solidarecon kun tiuj, kiuj havas malpli.

## DECEMBRO

**Por unu-gepatraj familioj**
Ni preĝu por la familioj, kiuj spertas la mankon de patrino aŭ patro, por ke en la Eklezio ili trovu subtenon kaj akompanadon kaj en la fido helpon kaj forton en malfacilaj momentoj.

Leono XIV
Vatikano, 1-a de julio 2025
Originalo: Itala